# Rezolucio de la 57a ILEI-Kongreso

La partoprenantoj de la 57a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), okazinta hibride – ĉeeste en Maceió, Brazilo, kun 27 partoprenatoj, kaj virtuale kun 57 partoprenantoj el 27 landoj tra la mondo - de la 20a ĝis la 27a de julio 2024, kun la ĉeftemo "Esperanto por justa edukado",

**KONSCIANTE** pri la fundamenta rolo de edukado en konstruado de pli justa kaj pli paca estonteco, kaj rekonante la gravecon de promocio de interkulturaj komunikado kaj interkompreno inter popoloj,

**KONSIDERANTE**, ke:

- Esperanto, kiel neŭtrala kaj facile lernebla lingvo, prezentas valoran ilon por superi lingvajn barojn kaj antaŭenigi internacian kunlaboron;

- Instruado de Esperanto povas riĉigi la edukajn spertojn de studentoj, evoluigante iliajn lingvajn, interkulturajn kaj kognajn kapablojn;

- La alpreno de Esperanto kiel komuna interlingvo en internaciaj kuntekstoj povas helpi redukti kostojn kaj plibonigi la efikecon de komunikado;

**KONSTATAS** kun granda kontento la sukceson de la nuna ILEI-Kongreso, kiu ebligis la partoprenon kaj interagon de 84 personoj el 27 diversaj landoj;

**ESPRIMAS** sian profundan dankon al:

- CESMAC (Centro pri Superaj Studoj de Masejoo) kaj ĝia vicrektoro, d-ro Douglas Apratto Tenório, pro la malavara kaj varma gastigado de la kongreso;

- Prof. Laura Brazzabeni kaj la Loka Kongresa Komitato, precipe s-ro Aristophio Andrade Alves Filho, pro la sindediĉa laboro en la organizado de tiu ĉi unika evento;

- La urbo Maceió pro la gastama bonvenigo kaj subteno;

**SUBTENAS** la gravecon de la ĉeftemo "Esperanto por justa edukado" kaj REKONAS la valorajn kontribuojn kaj diskutojn okazintajn dum la kongreso pri tiu ĉi temo;

**GRATULAS** la sukceson de la ILEI-Simpozio, okazinta la 26an de julio 2024 - koincide kun la Internacia Tago de Esperanto, kiu estas mem aparte gratulinda - kun la temo "Lingvoj de Instruado kaj Justa Edukado";

DANKAS profesoron Fernando Pita pro lia elstara laboro en la organizado de la Simpozio;

**BONVENIGAS** la kontribuon de la nova Virina Komisiono de UEA, kiu ĉi-jare transprenis la jam tradician organizadon de la "Virina Agado" dum la kongresoj de ILEI, substrekante la temon de "Interkultura Komunikado" ankaŭ el la virina vidpunkto per "Seminario pri Manĝ-etiketo" kaj aliaj valoraj kontribuoj dum la nuna Kongreso;

DANKAS profesorinon Alessandra Madella pro ŝia modela laboro en la organizado de la Seminario;

**REKOMENDAS**:

1. Promocii la instruadon de Esperanto en lernejoj de ĉiuj niveloj, plifortigante ĝian rolon en la edukado kaj kapabligo de civitanoj de la mondo;

2. Instigi edukajn instituciojn inkluzivi Esperanton en siajn studplanojn kaj organizi ankaŭ eksterlernejajn agadojn dediĉitajn al la studo kaj disvastigo de la lingvo;

3. Subteni esploradon en la kampo de Esperanto-instruado kaj la produktadon de novigaj kaj bonkvalitaj instrumaterialoj;

4. Kunlabori kun Esperanto-asocioj kaj internaciaj organizoj por antaŭenigi la uzadon de Esperanto en edukaj kaj kulturaj kampoj;

5. Alparoli la Edukministeriojn de diversaj landoj por rekoni la gravecon de Esperanto kaj alpreni konkretajn agadojn por instigi ĝian disvastigon;

**INVITAS**:

- Ĉiujn instruistojn integri Esperanton en siajn instruajn agadojn, uzante disponeblajn rimedojn kaj partoprenante en internaciaj kunlaboraj projektoj;

- Familiojn subteni la lernadon de Esperanto de siaj infanoj, rekonante ĝiajn efikajn kaj longdaŭrajn avantaĝojn;

- Internaciajn instituciojn antaŭenigi la uzadon de Esperanto kiel laborlingvon kaj subteni iniciatojn celantajn disvastigi Esperanton kaj ĝian kulturon;

**REEMFAZAS** la engaĝiĝon de ILEI pri la promocio de Esperanto kiel ilo por justa kaj egaleca edukado tutmonde;

**VOKAS** ĉiujn partoprenantojn kaj ILEI-membrojn daŭrigi la laboron por antaŭenigi la celojn kaj idealojn diskutitajn dum la kongreso en siaj respektivaj komunumoj kaj edukaj medioj;

**KONKLUDAS**, ke la instruado de Esperanto povas kontribui al konstruado de pli justa, egaleca, paca kaj helpema mondo, en kiu lingvaj diferencoj ne plu estos malhelpo al interkompreniĝo kaj internacia kunlaboro – sed nur kulturaj trezoroj, kiujn la komuna uzo de Esperanto alirebligos por ĉiuj.

Akceptita en Maceió, Brazilo, la 27an de julio 2024